



Erik Tantal

Strangaj nuboj

Originala poemaro en Esperanto

3-a Eldono

Erik Tantal

Strangaj nuboj

Originala poemaro en Esperanto

3-a Eldono

Enhavo

Antaŭparolo.....	4
Strangaj nuboj.....	7
Optimisma limeriko.....	9
La masko.....	11
Survoje per fervojo.....	13
Politikisto.....	16
Hunda sopiro.....	19
Lumbrika nuptonokto.....	22
Preskoboldo.....	24
Ridatakoj.....	26
Printempo*.....	29
La amo-vorto.....	31
Vizito al la zoo.....	33
Nekonata belulino.....	36
Lerta pentristo.....	39
Senpova.....	42
Malfacilaĵoj.....	44
Vegana karotokuko.....	46
Ĉe la plaĝo.....	48
Ĉe marbordo.....	51
Kial?.....	53
Lulkanto*.....	55
Vigla melodio*.....	57
Somero.....	59
Marknomoj.....	61
Postparolo.....	64
Danko.....	66
Fontoj.....	67
Kolofono.....	69
Apendico.....	71

Antaŭparolo

Mi konfesas, ke mi certe parte malobeas la unuan devon de la regularo „Dek devoj de Esperantistoj“:

*Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto, kaj lasu la versfaradon al poetoj. [*1]*

Kion signifas „Bone sciu la lingvon“?

Ja, mi jam dum multaj jaroj traktas Esperanton, sed mi ofte rimarkas, ke mi ĉiam trovas ion novan en tiu lingvo. Do, kiam sufiĉos? Ĉu mi devas atendi ĝis perfekteco? Ne, mi ne volas tion. Tial mi pardonpetas, se vi trovas erarojn.

Kion signifas „lasu la versfaradon al poetoj“?

Kiu estas poeto? Ĉu estas nur profesiuloj? Ne, mi certe ne estas profesiulo, sed mi traktas la lingvon kun respekto kaj mi klopodas plibonigi mian lingvan kapablon. Tial mi ĝojos, se vi sendos al mi viajn proponojn.

Eta noto: La markitaj titoloj (kun asterisko-simbolo) apartenas al kantotekstoj. Por tiuj mi komponis melodiojn, kiujn mi prezentas sur mia hejmpaĝo. La muzikfoliojn vi trovas en la apendico.

La tria eldono de mia poemaro enhavas 24 poemojn. Mi forprenis la Hildebrand-kanton kiu estis prezentita en la antaŭaj versioj. Ekzistas ja bona traduko de Baldur Ragnarsson [*5].

Krom la novaj poemoj mi aldonis kelkajn notojn al ĉiu poemo.

Erik Tantal

Hamburgo, 2022

Strangaj nuboj

Tie nun supre, en blua ĉiel',
migras vatbuloj, blankaj figuroj.
Estas la ver', ne simple fabel',
lerta artist' kun akra martel'
zorgis pri la konturoj.

Ne longe videbla sur la ekran'.
Jen nova form', kia freŝa aspekt'.
Ĝi malaperas, kia ĉikan'!
Rapida ŝanĝo, jen nova plan'.
Komprenas la arkitekt'.

Ankoraŭ aspekto kiel lepor',
kaj tuj poste la nova vizaĝ'.
Ne estas temp', nur restas vapor',
kunpuŝita de forta motor',
feliĉa sur la vojaĝ'.

Vizaĝo de l' pork' aŭ estas ĉeval' ?
Kiu decidas? Tro peza demand'!
Neklara la bild', ĉu estas narval' ?
Ĝi naĝas en la ĉiela ĝangal'!
En maro sen ia strand'.

Kelkaj notoj...

Estis varma tago, posttagmeze. Mi ripozis sur la blanka ĝardeno seĝo. Bedaŭrinde ĝi estis iom tro mallarĝa. Tial mi devis kuŝi sur la dorso.

La apuda ĉarpentaĵo estis abunde surkreskita de rozoj kaj vinberfolioj. Ili parte kovris mian rigardon al la blua ĉielo kie preterflugis la blankaj nuboj. Nur kelkfoje aperis aviadiloj, sed la birdoj daŭre flugis tien kaj reen. Post kelkaj minutoj mi ekdormis. Mi ne scias kiom longe mi tiel dormis. Kiam mi vekigis, mi vidis strangajn figurojn sur la ĉielo....

La poemo 'Strangaj nuboj' provas konservi tiun etoson per kvar strofoj kun rimoj laŭ la skemo ABAAB.

La versoj havas 10, 10, 9, 9 kaj 7 silabojn.

Mi uzis tiujn poetikajn piedojn:

Trokeo [Oo], amfibrako [oOo] kaj jambo [oO].

Optimisma limeriko

Foriris de l' ĉielo la suno.
Nun iras denove la luno.
Li vidas la teron.
Li konas la veron.
Por li estas nubo kaj puno.

Eĉ regas dum nokto teruro.
Ne povas ekdormi sciuro.
Ĝi timas la tagon,
ne ŝatas la plagon.
Nur ĝojas avida vulturo.

Malpaco en ĉiu regiono.
Nenie la ŝanc' por pardono.
Ni kaŭzas ruinon.
Ni konas destinon.
Sufiĉus nur unu bombono.

La ĝojo por ĉiu infano.
Sed ankaŭ por bunta fazano.
Li levas la voston,
eldiras la toston,
pro fino de ĉiu ĉikano.

Kelkaj notoj...

La poemon ‚Optimisma limeriko‘ mi skribis en la jaro 2022, kiu estis ankoraŭ influita de la korona pandemio. Krome, la milito en Ukrainio alportis pliajn zorgojn. Tamen mi pensis ke pesimismo ne estas la ĝusta sinteno al la vivo. Kvankam limerikoj kutime estas ŝercpoemoj, mi elektis tiun specon.

Laŭ kutima limeriko havas po kvin versojn en strofo kaj 3, 3, 2, 2, 3 trisilabajn piedojn el amfibrakoj aŭ anapestoj. Sed mi rimarkis, ke la lasta linio de mia unua strofo ne kongruas al tiu skemo. Pardonu min.

*oOo oOo oOo
oOo oOo oOo
oOo oOo
oOo oOo
oO Oo Oo oOo*

*Sed en la aliaj strofoj la lastaj linioj obeas al la ĝusta skemo
oOo oOo oOo.*

Do, mi konservas mian optimismon!

La masko


La maskon ne forgesu vi sur ĉiu via voj' .
Sen masko estus tragedi' , nur stres' sen iu ĝoj' .

En buso, trajno, en bazar' regas la kamuflaj' .
Tute ne gravas la kolor' , ĉar nigra, blanka, bunta ŝtof'
ja estas nur dekor' , ja pravas ankaŭ filozof' .

Tial vi spiru kun trankvil' , unue vi enspiru,
kaj poste vi elspiru, denove vi enspiru,
trankvila, ĝusta stil' .

Baldaŭ en via dom' , la masko pendas sur la hok' ,
el kuirej' venas arom' , bongustas nun la artiŝok'
kun saŭco kaj bier' , la fin' de la sufer' .

Sed maskon ne forgesu vi, alie morgaŭ tragedi' .



Kelkaj notoj...

Tiu eta poemo ekzakte ĝustas por la tempo de la pandemio. Ĉiuj devas sekvi la regulojn de la higieno. Kaj preskaŭ ĉiuj obeas. Kompreneble troviĝas ankaŭ kelkaj, kiuj ne konsentas. Sed diskuto ofte ne eblas. Normalaj homoj, kiujn vi renkontas ekzemple sur la platformo de stacidomo, komencas laŭte averti vin se vi ne portas maskon. Tion mi spertis en Germanio. Ĉu tio okazas ankaŭ en aliaj landoj?

Mi krome skribis germanan version de tiu poemo kaj faris repmuzikan prezentaĵon kun la muziko de mia "Lulkanto". Tio estis denove dufoje aranĝita de Kaysn. La repmuzikaj prezentaĵoj estas aŭskulteblaj sur la YouTube-kanalo sub mia plumnomo Erik Tantal.

*<https://www.youtube.com/watch?v=3j2Rmb9qQTM>
Die Maske/La Masko (L)*

*<https://www.youtube.com/watch?v=wazuek680Pg>
Die Maske/La Masko (S)*

Survoje per fervojo

Survoje per fervojo
al ĉefa stacidom'
vojaĝas mi kun ĝojo
kiel feliĉa hom'.

Nur ĝenas min la masko
pro l'aĉa pandemi'.
Ĝi zorgas pri la tasko,
pri sana strategi'.

Regas strikta regulo.
Ĉu taŭga aŭ ĉu ne?
Se dubus iu ulo,
venas la pun', ho ve!

Necesas la distanco
al via proksimul'.
Nur estas magra ŝanco
rekoni per okul'.

Rigardo al virino,
kaŝita, sen kaŝpens'.
Nun mankas la fascino.
Pro masko mankas senc'.

Eĉ belus la vizaĝo,
amika kun natur'.
Kovrita per bandaĝo
perdiĝas la plezur'.

Maloftas la momento
por bela maneken'.
Aperas la prezento,
leviĝas la kurten'.

Ŝi manĝas pro malsato
kaj liberigas ŝin.
Jen venas rezultato.
Ŝi eĉ rigardas min!



Do, manĝi sen la masko
ebliĝas nun sen hasto.

Kelkaj notoj...

Denove temas pri la masko. Dum la pandemio la homoj ofte ne povas bone rekoni eĉ la proksimulon. Krome multaj homoj kondutas nun malsame ol antaŭ la pandemio. Ili preskaŭ ne plu atentis siajn kunhomojn. Estas ja kompreneble. Ĉiu estas apartigita de la proksimulo per tiu masko. La smartfono, kiun preskaŭ ĉiuj uzas, plifortigas ĉi tiun konduton. Ekzemple en busoj aŭ trajnoj neatentante la aliajn homojn, oni nur rigardas al la eta ekrano. Ofte, kiam la aparato estas uzata kiel telefono, ĉiu en la kupeo povas aŭdi ĉion.

Mi mem ja ne uzas la smartfonon. Tial mi paceme sidas en la vagono kaj povas registri tian konduton. Nur en tre maloftaj momentoj la situacio ŝanĝiĝas.

Ĉi tie en busoj kaj trajnoj estas devige porti maskon. Sed ĉiu rajtas manĝi aŭ trinki ion sen la masko.

Politikisto

Petro estas saĝa knabo,
kun la plan por la futur'.
Certe en altranga stabo.
Realiĝo pro l' natur'.

Panjo, ĉu vi scias jam?
Petro estas optimist'.
Kaj nun venas la proklam'.
Estos mi politikist'!

Ne kontenta la patrino.
Kia stulta la ide'!
Kial tiu halucino?
Simple diras mi nur: Ne!

Mi jam pensis pri l'motiv',
diras Petro kun certec'.
Profesi' kun bona viv',
estas part' de fama spec'.



Estos mi en televido.
Ĉiuj homoj konos min.
Estos mi asteroido,
ne nur laca zepelin'.

Mi vojaĝos tra la mond'.

Multe kostas la hotel'.
Sed por riĉa vagabond',
eĉ pli gravas vinbotel'.

Sed pripensu, mia filo.
Ne facilas reelekt'.
Tial restas la konsilo:
Sen elekto, sen protekt'.

Panjo, jen neniuj ŝerc':
Mi ja estos lobiist',
arda por armilkomerc'.
Estos mi politikist'!



Kelkaj notoj...

Entrepreneoj de la armila industrio ofte uzas bonajn rilatojn al politikistoj por prosperigi la komercon. Tial ili fondas asociojn kiuj servas por subteni la kontaktojn inter politikistoj kaj la firmao. La membroj de tiaj asocioj estas 'lobiistoj' kiuj nun provas influi la leĝfaradon por favori la armilan industrion.

Troviĝas ankaŭ lobiistoj kiuj parttempe laboras en tiaj asocioj kaj tie ricevas altajn salajrojn, kiujn ili ofte kaŝas.

Kaj post la fino la politika agado kelkaj politikistoj ricevas novan fruktodonan postenon en la armilindustrio. Tiaj kazoj estas kompreneble raportitaj en amaskomunikiloj kun granda indigno. Sed post kelka tempo ĉiu forgesas tion...

Hunda sopiro

Sur fenestrobreto sidas
hundo, kun sopir' rigardas
ĉiutage tra l' fenestro.
Stranga estas tiu besto.

Ne nur stranga,
kurioza
estas ankaŭ roza kato
jen en aliflanka strato.

Kurioze
kaj mistere
ankaŭ sidas ĝi sur breto.

Kio estas la magneto?

Kato vere serioza,
kurioza,
grandioza,
proza,
roza.

Iun tagon sur la breto
estis ŝanĝo de l'sekreto.
Nia hundo ne plu gapis,
de l' fenestro nun eskapis
kun malĝojo
kaj sen bojo
ne plu mordis grasan oston
kaj mallevis sian voston,

ĉar la kato
de la strato
aliflanka ne plu estis
sur la loko, kie restis
potoj kun belegaj floroj
por doloroj,
kaj la ploroj,
foroj,
koroj.

Posedanto de la hundo.
Li atendas ne ĝis lundo
kaj demandas najbarinon,
kiu tenas la katinon.

Kun kompreno
la forpreno
de la floroj sur fenestro
estas helpo por la besto
por rigardo
nun kun tardo
al la aliflanka hundo
kiu nun eĉ je la lundo
sidas sur fenestrobreto.

Rigardeto.

Silueto.

Breto.

Reto.

Kelkaj notoj...

*La bazon por la poemo 'Hunda sopiro' mi trovis en kortuŝa Youtube-video [*2]. Mi priskribis la rakonton de tiu filmo en mia e-libro 'Misteroj' [*3]. Temas pri hundo, kiu ĉiun tagon trifoje sopire rigardis tra la fenestro, kaj kato, kiu same sintenis. Do la enhavo de la poemo baziĝas sur vera okazaĵo.*

*La poemo havas tri strofojn. Ĝi montras nekutiman strukturon. Mi provis iomete kopii tiun strukturon de la poemo 'Postebrio' el la libro 'Koploj kaj filandroj' [*7]. Tiu poemo havas du strofojn, sed la rakonto pri la hunda sopiro bezonas plu.*

Jen la superrigardo pri la nekutima strukturo (de la unua strofo). La numero rilatas al la nombro de la silaboj en unu linio, la litero markas la rimon):

*8A, 8A, 8B, 8B, 4C, 4C, 8D, 8D, 4E, 4E, 8F, 8F, 8C,
4C, 4C, 2C, 2C*

Lumbrika nuptonokto


En la teron rampas la tervermo
kun volupto serĉas ĝi partneron.
La testikoj ĉiuj kun spermo.
Ĝi preparis zorge la aferon.

Spermon ankaŭ portas kunludanto.
Ankaŭ ĝi nun rampas kun volupto.
Ĝi ne estas stulta diletanto,
ĉar sopire strebas ĝi al nupto.

Gefianĉoj en surtera lito.
Ambaŭ estas baldaŭ tre proksimaj.
Komenciĝas nun la nupta rito.
Amorantoj estas tre intimaj.

La terverm' estas hermafrodito.
Krom la spermo kreskas la ovoloj.
Reciproka estas la profito
por teneraj veraj karamboloj.

La partneroj dancas nun kun amo.
Baldaŭ jam aperas la kokonoj.
Nun la paro pretas por proklamo:
Pensu ne, ke tiuj estas ŝtonoj!



Kelkaj notoj...

„Lumbrika nuptonokto“ estas poemo por homoj, kiuj interesiĝas pri biologiaj aferoj. Ĝi prezentas la seksan reproduktadon de la tervermoj. Kompreneble estas nur simpligita priskribo kiu intencas esti humorplena.

Tervermoj estas hermafroditoj. Se la vetero permesas, la seksmaturaj vermoj venas al la surfaco kaj serĉas partneron. Ili devas esti ligitaj per muko por interŝanĝi spermoĉelojn unu kun la alia. Kelkaj tagoj post tiu interŝanĝo okazas la fekundiĝo de la ovoĉeloj. La tervermo formas kokonon de muko kiu iĝas kapsulo kun la larvoj. Nur post proksimume 100 tagoj eloviĝas la novaj vermoj.


La strukturo de la poemo similas al nia Esperanto himno (En la mondon venas nova sento). Mi esperas ke tio ne kaŭzos problemojn por iu samideano.

Preskoboldo

Aŭtoro komencis editi,
forĝesis profunde mediti.
Li serĉis titolon,
forĝesis kontrolon,
kaj poste li povis nur ŝviti.

Aŭtoro daŭrigis laboron,
sed baldaŭ li sentis angoron.
La tekst' estis preta,
ĝi estis kompleta,
sed grumblis la saĝa lektoro.

Stultaĵo, aĉaĵo, eraro!
Vi fuŝis ja nur sen komparo!
La vort' estu pugno!
Sed vi skribis 'pugo'!
Eĉ ridas la dromedaro.



Kelkaj notoj...

Tiu poemo ankaŭ similas al limeriko, kvankam ne ĉiuj linioj rigide obeas al la kutima skemo.

La bazo por la poemo estas vera okazintaĵo. Ĝi okazis dum mi skribis mian e-libron 'La Kimero', kiu estas prezentita sur mia hejmpaĝo. Post la finpreparado mi kompreneble estis tre fiera. Plurfoje mi tralegis la tekston kaj aliaj samideanoj ankaŭ faris tion. Tamen ni ne rimarkis ke ankoraŭ kuŝis unu eraro en la verketo.

Mi forgesis skribi unu literon. Kompreneble facile supervidebla. Feliĉe, ke ĝis nun neniam ekkovris tiun eraron. Sed estas iomete ĝena afero. Mi volis skribi rilate al la frazo pri la ludo 'Ching-Chang-Chung':

„Ĉu li volas doni al ni tri signalojn?“, demandis Volker kaj nun ankaŭ ripete montris tiujn movojn per la sama ritmo, kiel pugno, manplato kaj manplato kun disetenditaj fingroj.

Verŝajne vi jam trovis la embuskon. Mi verdire ne skribis 'pugno', mi forlasis la literon 'n'!

Ridatakoj

La doktoro Frenezulo
zorgas ne nur pri pustulo.
Ĝuas li grandan prestiĝon.
Do, esperu resaniĝon.

Benjamin havas problemon.
Ofte li eligas ĝemon,
ĉar li daŭre devas ridi.
Tiam li ne povas vidi,


ĉar pro rido fluas larmoj.
Kontraŭ ĝi ne estas armoj.
Venas li al kuracisto,
ĉar li estas optimisto.

Helpu min kara doktoro!
Multaj ridoj sen humoro.
Mi suferas pro torturo.
Helpu per akupunkturo.

Mia kara Benjamins.
Nek la pinglo nek morfino
helpus kontraŭ la torturo.
Helpas nur mia fakturo.

Post rigardo al kalkulo

malaperos rid-stimulo.
Tre efika la kuraco.
Dankon jam pro la donaco.



*Surbaze de ideo de Kaysn (desegnisto de bildstrioj),
kun afabla permeso de la artisto.*

Kelkaj notoj...

La bazo por la poemo ‚Ridatakoj‘ estas eta bildstrio, de mia filo Kay. Li permesis uzi la ideon. La bildstrio estis ankaŭ ŝablono por la bildoj, kiujn mi desegnis.

Temas pri la stranga kuracisto 'd-ro Frenezulo', kiu prezentas tre altan fakturon al la paciento.

Tiu poemo celas prezenti spritan troigon. Mi pensas, ke la plej multaj kuracistoj ne estas tiom avidaj. Krome neniu kuracisto en Germanio mem prezentos la fakturon al sia paciento. Sed certe estas ankaŭ kazoj, kiuj konfirmas la suspekton, ke avideco ludas gravan rolon.

Iam mi ricevis fakturon de mia familia kuracisto. Mi trovis enskribon, kiu rilatis al 'profunda studo de pluraj organoj'. Por tio la kuracisto postulis salajron. Sed mi tute ne sciis ion pri tia esploro. Mi nur rememoras, ke estis konversacio inter mi kaj la kuracisto dum tiu li prenis mian brakon por kontroli mian pulson. Ĉu tio estis la 'profunda studo'?


Kompreneble mi ne pagis. La kuracisto akceptis mian proteston kaj skribis novan fakturon.

Printempo*

Nun floras la pomarbo.
La vintro estas for.
Printempa vigla ardo.
Printempa flor-odor'.

Varmaj sunradioj tuŝas
vian haŭton kun abund'.
En la mola herb' vi kuŝas.
Ĝoju pri ĉiu sekund'.

Senĉese pepas birdoj nun.
Belega la prezent'.
Ne estas nuboj, nur la sun'.
Printempa firmament'.



Kelkaj notoj...

Tiu eta poemo estas kantoteksto. La melodio troviĝas en la apendico. Mia filo Jan krome skribas akompanadon por gitaro. Tio estas prezentita sur mia hejmpaĝo.

Jen la strukturo de la poemo:

oOo OoOo	7	A
oOo OoO	6	B
oOo Oo Oo	7	A
oOo OoO	6	B

Oo Oo Oo Oo	8	C
Oo Oo ooO	7	D
Oo OoO oOo	8	C
Oo OOo oO	7	D

oOo Oo Oo O	8	E
oOo OoO	6	F
oOo Oo OoO	8	E
oOo OoO	6	F

La amo-vorto

Franclingva vort' estas l'amour,
trovebla en literatur'.
La angloj simple diras love,
facile skribas stenograf'.

Vi nur bezonas tiun vorton
en ĉiuj lingvoj de la mond'.
Bone influu vian sorton.
Vi mirus baldaŭ pri l' respond'.

Koreoj flustras nur sarang,
ja tiu vort' ne estas slang'.
Láska, estas ĉeĥa esprim',
sed diru tion nur sen tim'.

Forgesu ne, ke en Kenio,
en ĉiuj lokoj de la land',
mapenzi estas ĉiam ĉio.
Pri tio mankas la demand'.

Pliajn ekzemplojn serĉu mem.
Hungaroj vokas szerelem.
Prononco estas la problem'.

Kelkaj notoj...

La poemo enhavas la 'amo-vorton' nur en la sekvaj tradukoj:

<i>AMOUR</i>	<i>franca</i>
<i>LOVE</i>	<i>angla</i>
<i>SARANG</i>	<i>korea</i>
<i>LÁSKA</i>	<i>ĉeĥa</i>
<i>MAPENZI</i>	<i>svahila</i>
<i>SZERELEM</i>	<i>hungara</i>



Per la reta tradukilo de Google vi facile trovas kromajn tradukojn:

<i>LIEBE</i>	<i>germana</i>
<i>CINTA</i>	<i>indonezia</i>
<i>AMORE</i>	<i>itala</i>
<i>SEVGI</i>	<i>azerbajĝana</i>
<i>MAITASUNA</i>	<i>eŭska</i>
<i>KÆRLIGHED</i>	<i>dana</i>
<i>ARMASTUS</i>	<i>estona</i>
<i>RAKKAUS</i>	<i>finna</i>

Sed ofte la fremdaj lingvoj uzas ankaŭ fremdajn literojn...

Vizito al la zoo

En la bela zoopark'
loĝas ne nur tigroŝark'.
Tie vivas kanguru',
urso kaj la kakatu'.
Tial venas vizitant'.
Tion scias elefant'.

Kiam, kiam, onklo Ĵon?
Por l' bilet kiom da mon'?
Petas Petro sen pacienc'.
Tamen estas konsekvenc'.
Tranĉu heĝon kaj eĉ pli,
Vi laboru nun por mi!


Petro jesas sen grumblad'.
Grava estas nur persvad'.
Ek al l' zo' kun la bilet'!
Onklo plendas pro l'buĝet'.
Petro gaje saltas nun.
Lin favoras la fortun'.

Blanka urso kaj azen'
ĝojas en la bestĝarden'.
Petro kaj orangutang'
ambaŭ klakas per la lang'.
Li sidiĝas apud ĝi.

Jen amik', ne fantazi'.

Ambaŭ fiksrigardas nun,
lumigitaj de la sun'.
Harmoni', sen iu paŭz'
inter du, pro kia kaŭz'?
Estas vera amikec'
malgraŭ la alia spec'.

Iru nun, venu kun mi!
Estas onkla opini'.
Petro volas resti nur.
En la zo' estas plezur'.
Vera estas nun la fakt'.
Du amikoj en kontakt'.



Kelkaj notoj...

La strukturo de tiu poemo similas al ‚Max und Moritz‘ de Wilhelm Busch (Esperanta versio de Rudolf Fischer ‚Maks kaj Moritz‘). Ĉiu verso konsistas el du jamboj kaj unu amfibrako: Oo Oo OoO. Du sekvantaj versoj havas la samajn rimojn.

Ankaŭ tiu poemo baziĝas sur vera okazaĵo. Sed ne temas pri onklo kaj nevo. La ĉefa protagonisto estis lernanto el mia klaso. Tiatempe mi gvidis klasvojaĝon al Basel/Svislando. Tie ni vizitis la belan zooparkon, kiu vere estas vizitinda.

Mi permesis ke la gelernantoj rajtis promeni tra la parko en grupoj el du aŭ tri. Ili ja estis en la deka klaso. Sed post unu horo mi postulis kunvenon apud la impona baraĵo de la rinoceroj.

Post unu horo preskaŭ ĉiuj venis al la interkonsentita kunvenejo. Preskaŭ. Mankis nur Manfred.

Feliĉe lia amiko sciis kie li laste vidis lin. Li ĉiam ankoraŭ estis en la domo por la grandaj simioj. Tie li sidis antaŭ la fenestro kaj fikse rigardis orang-utangan, kiu sidis malantaŭ la vitro kaj fikse rigardis la junan homon.

Nekonata belulino

Kiom ofte mi nur preterpasis?
Kiom ofte mi ne vidis vin?
Kiom ofte venis mi kaj pasis?
Tiom ofte regis nur rutin'.

Kiom ofte blinde mi nur paŝis?
Tiel stulta estis mi. Kial?
Ĉu vi vere vin intence kaŝis?
Vi ja kreskas teren' sen vual'.

Estas tempo, plene mi vekigu.
Estas tempo por la tag' de l' ŝanĝ'
Ne demandu, simple nur klinigu!
En herbej' troviĝas la aranĝ'.

Eta plant' kun floro belaspekta,
mankas pomp', sed ĉiam estas ŝik'.
Ne trudema, simple nur ĉarmega.
Ĝuste taŭga por bona lirik'.

Rozkolora Robert-geranio.
En herbej' ŝi estas sinjorin'.
Ŝi briletas ja pro simpatio.
Por la mond' ŝi estas la princin'.

En Eŭropo, ankaŭ en Afriko,

en Azio vivas ŝi kun ĝoj'.
Ankaŭ vi nun estu koramiko.
Trovu ŝin, ŝi estas ĉe la voj'.



Geranium robertianum
Robertiella robertiana

Kelkaj notoj...

Antaŭ la enirpordo de nia loĝejo estas metala kadraĵo. Tra tio la malpuraĵoj de la ŝuoj falas malsupren en keston. Enirante la pordon mi normale ne atentis pri tio. Sed iun tagon mi rimarkis, ke en tiu kesto kreskas eta planto. Ĉarma rozkolora floro supreniris tra la kadro. Mi pli detale ekzamenis la aferon. Verdaj folioj kovris la malpuraĵon, kiu estis falinta malsupren.

Tiu planto estas vera specialisto pri transvivado! Ĝi evidente toleras la magran provizon de lumo kaj akvo.

En Vikipedio vi trovas kelkajn informojn pri tiu interesa planto.

*Estas la Robert-Geranio, (*Geranium robertianum*, sinonimo *Robertiella robertiana*)*

Ĝi havas foliojn, kiuj similas al filiko, la rozkoloraj floroj estas nur ĉirkaŭ 1 cm grandaj. La planto apartenas al familio de Geraniacoj.

Nun mi estas multe pli atentema. Kiam mi promenas, mi ofte trovas ĉi tiujn florojn ĉe la vojrandoj en la herbejo.

Lerta pentristo

Pentristo pensas kaj pensadas
pri nova verk', vera artaĵ' .
Pentrist' jam laŭte fanfaronas:
Art' ne nur temas pri amaĵ' .

Pentrarton bonan faros mi.
Estos plezuro por spektanto
Altir' pro la belec' de ĝi.
Mi famos kiel artkreanto.


Sed eĉ post multaj longaj horoj
mankas ide', malgraŭ la pen'.
Ne plaĉas por l'artist la floroj.
Do, li ekdormas sur l' kusen'.

Dormeto vere helpas lin.
Venas koncepto kaj impeto.
Kolor' nun estu la karmin',
koloro por la tuta breto.

Venontan tagon la pentristo,
ravita de l' bela malnet',
li sentas sin vera artisto.
Pli alta estu la buĝet'.

La bildo estas preta nun.

Motivo êc ne plu necesas.
Karmin' signifas ja fortun'.
Kun bilda kadro ĝi belegas.



Kelkaj notoj...

La lerta pentristo certe konis la faman pentraĵon 'Nigra Kvadrato', kiun kreis Kazimir Maleviĉ en 1915. Tiu futurista bildo apartenas al la ĝenro 'suprematismo'. La originalo troviĝas en Moskva galerio. Ĝi estas tre valora kaj kostus verŝajne pli ol 50 milionojn da Eŭroj.



Mi ne komprenas, kial tia pentraĵo povas esti tiom valora. Sed mi ja ne estas eksperto sur tiu kampo.

La lerta pentristo ne havas ideon pri bona motivo. Li simple komencas kolorigi la tolon per karminruĝa farbo. Li estas tre lerta ĉar li ne uzas ruĝan koloron. Li ja ne volas simple kopii verkon de Maleviĉ, kiu ankaŭ pentris ruĝan kvadraton. Karminruĝa koloro estas klare diferenca de la ruĝa, ĉu ne?

Senpova

Mi sentas min senpova.
Okazas tiom multe.
Nun estas mi senmov
kaj ploras nur singulte.

Mi timas pro malsanoj,
pro krimoj kaj milit',
pro tiom da skandaloj,
eĉ ankaŭ pro l' moskit'.

Stultec' kaj malbraveco
abundas en la mondo,
kondukas al sklaveco.
Englutos nin la ondo

de aĉaj diktatoroj,
frenezaj kaj avidaj.
Nur kaptas nin hororoj.
Ni estas forlasitaj.

Do, venku la mizeron!
Eĉ mankus la savant'
Ne ŝatas ni inferon.
Ne helpas la plorkant'.

Kelkaj notoj...

Laŭ Vikipedio <poezio estas formo esprimi emociojn, sentojn, ideojn kaj konstruaĵoj de la imagopovo.>

Per la poemo ‚Senpova‘ mi provis esprimi sentojn, kiuj verŝajne ŝarĝas ankaŭ multajn aliajn.

Ni vivas en tempo kun gravaj problemoj. La amaskomunikiloj ĉiutage superverŝas nin per negativaj novaĵoj. Kompreneble ĉi tio influas nian psikon. Estas la risko fali en depresion. Sed nur la principo 'espero' povas helpi nin malgraŭ nia senpoveco.

Malfacilaĵoj

Malsekiĝanta, ŝanĝeliganta,
edziniĝanta, malakceptanta,
nekomparebla kaj prognozebla,
neestingebla kaj rezistebla.

Ĉu vi komprenas?

Ĉu vi dormplenas?

Ĉu atentema

kaj interstela?

Nepriplorata, supertaksata,
alkutimiĝinta,
sunbruligita.

Kial doloro?

Ne estas valoro.

Ne taŭgas la floro.

Tro frua horo.

Ba, ba, likvoro!



Kelkaj notoj...

Eĉ nia facile lernebla Esperanto ne estas libera de kelkaj malfacilaĵoj. Al tio apartenas precipe multaj kunmetitaj vortoj. La vortfarado estas tre efika kaj logika, sed la rezulto estas ne ĉiam facile prononcebla kaj kelkfoje ne tuj bone komprenebla. Tio ne validas por spertaj Esperantistoj. Ili ja bone regas la gramatikajn regulojn kaj tial ne havas problemojn. Sed komencantoj aŭ homoj, kiuj ne ofte uzas Esperanton, devas longe pensi por bone kompreni kaj flue prononci la vortojn.

Krome kelkaj kunmetitaj vortoj estas tre longaj. Tio ofte estas neevitebla. Sed kelkfoje ekzistas ja ankaŭ mallongaj formoj. Ekzemple: malbutonumi aŭ malbutoni.

Mi konfesas ke la vortoj <edziĝi> kaj <edziniĝi> kaj la kromaj kunmetaĵoj kun tiuj vortoj ĉiam ankoraŭ kaŭzas problemojn por mi. Aŭdante tiujn vortojn mi unue devas pripensi trifoje. Eĉ pli malfacilas la prononcado.

Sed la eta poemo ‚Malfacilaĵoj‘ ebligas ja bonan trejnadon.

Vegana karotokuko

Se vi volas vi povas, vi baku nun.

Oleo, sukero, bonfortun'.

Raspitaj karotoj, sojolakto'.

Pinĉaĵo da salo en ĝusta takto'.

Tritika faruno, citrona sukto'.

Vanilita sukero, ne estas trukto'.

Bakpulvoro plej bone kun tartrato',

aldonita zorgeme kun kantato'.

Nun miksu kukpaston, kontrolu ĝin.

Kirlu kulere sen iu maŝino'.

Preparu bakmuldon per bakpapero'.

Nur sesdek minuta varmega afero'.

Ingrediencoj

30 g vegetaĵa oleo
125 g sukero
125 g raspitaj karotoj
vanilita sukero
suko de citrono
pinĉaĵo da salo
250 g tritika faruno
bakpulvoro (tartrato)
sojo-lakto

Kelkaj notoj...

Vegana manĝaĵo fariĝas ĉiam pli populara. Tial la malnova recepto pri la karotokuko povas esti interesa. Jes, estas tre malnova recepto. Mi trovis ĝin en skatolo de mia patrino. Estis eta slipo, peco da papero ŝirita el paketo por bakpulvero. Ĝi devenis verŝajne el la tempo de la dua mondmilito.

Tiutempe mankis nutraĵoj en Germanio. Sed la virinoj ne ĉesis baki kukojn por la viroj ĉe la fronto. Ĉi tiu recepto ne bezonis ovojn. Tiu kuko estis bona por sendi ĝin per poŝto. Ĝi estis sufiĉe stabila kaj krome tre sukoplana, eĉ post longa tempo. Kaj nun la plej grava informo:

Vegana karotokuko vere bongustas!

p.s.

Mi iomete ŝanĝis la originalan recepton. Uzu bakpulvoron kun tartrato, ĉar tiam la gusto estas pli bona.

Ĉe la plaĝo

Onklino Lola, onklo Jan kun nepo Benjamin,
kaj ankaŭ pluŝa pelikan'. Renkonto kun destin'.
Ĉe vasta mar', ĉe bela strand', bantuko en la man'.
Ferioj por la tuta land'. Ripozo estas plan'.


La mildaj ondoj, varma vent'. Proksime restu nur!
Profunda akvo, do atent'! En maro mankas mur'.
Amuze estas, flugas temp'. Malsekas ĉiuj nun,
kaj ĉiuj brilas de kontent' kaj iras al la dun'.

Tiom da homoj sur la plaĝ' kuŝantaj sur bantuk'.
Ĉiu oleis, brunvizaĝ'. Bongustas fruktosuk'.
Bantukojn niajn serĉu vi! Rapidu onklo Jan!
Do serĉu bone, estas tri ĉe nia pelikan'.

Ho ve, ekvokas Benjamin. La pelikano for!
Ĝi estas for, ĉu halucin'? Aŭdiĝas laŭta ĥor'.
Serĉado dum la tuta hor'. Finfine la sukces'.
Trovita pup', ne estu plor'. Prenita sen permes'.

Du fremdaj knaboj ludas nun' kun ĉarma pelikan'.
Sen timo pro sekvanta pun' de pupa akompan'.
Ne montras sin la tukoj tri. Kien rigardu nin?
Tre malesperaj estas ni! Ja mankas medicin'!

Finfine venas la feliĉ'. Laŭorde sur la lok'
bantukoj tri eĉ kun sandviĉ'. Sen tukoj estus ŝok'.



Kelkaj notoj...

Mi konas tion. Ofte mi serĉas miajn okulvitrojn. Kvankam mi havas pli ol nur unu vid-helpilon mi estas maltrankvila ĝis mi trovas ĝin. Kelkfoje ĝi sidis eĉ sur la nazo de mia edzino.

Kaj en superbazaro. La butikĉaron mi lasas antaŭ la fridujoj ĉar mi forgesis la cepojn. Rapide mi iras al tabloj kun fruktoj kaj legomoj. Reveninte mi ne trovas mian butikĉaron. Ĉu mi estas en la malĝusta koridoro? Tie ja staras unu, sed tio ne estas la mia. Mi ne bezonas tiujn skatolojn kun hunda manĝaĵo. Post iom da tempo la problemo estas solvita. Alia aĉetanto venas kaj petas pardonon ĉar li hazarde prenis mian ĉaron.

La familio kun Benjamin havis similan sperton ĉe la strando. Post la bano en la akvo ili ne retrovis sian lokon. Troviĝis tro multe da similaj buntaj bantukoj sur la sablo.


Ĉe marbordo

La mevoj krias laŭte ĉe marbordo.
Muĝas la ondoj, dancas sub la vent'.
Flugas la nuboj haste en akordo,
kovras la sunon foje kun konsent'.

Homoj promenas pace sur la plaĝo.
Nudaj piedoj ĉe la mara rand'.
Pro akraj konkoj gravas la kuraĝo.
Malmolaj ŝtonoj pikas sen demand'.

Malsato nin molestas dum migrado.
Bongusta bulko jen en dekstra man'.
Aŭdiĝas nun terura morkriado.
Por mevo estas efektiva plan'.

Rapide bulkon ŝtelas ĝi en flugo.
Ne povas fari prirabita hom'.
Nur restas plumo blanka kun lanugo.
Ŝtelisto nun fariĝas la fantom'.



Kelkaj notoj...

Tre inteligentaj, tiuj birdoj! Estas multe pli facile ŝteli fiŝsandviĉon de turisto ol serĉi ion manĝeblan en la naturo. La turistoj mem kulpas. Ili logis la mevojn kun pecoj da pano. La ŝildo 'Ne manĝigu la mevojn!' ne havis efikon. La birdoj ankaŭ prenis la panerojn, kiuj falis malsupren dum manĝado. Jen kiel la mevoj lernis sian lecionon.

Sed ili fariĝis pli kaj pli agresemaj. Ili flugas proksime al la homo kaj kaptas la bongustan pecon, kiun li tenas en la mano. Tuj poste la ĉasisto forflugas kun la predo.

Kelkfoje la mevoj ankaŭ alproksimiĝas al la bantukoj aŭ la strandoseĝoj por trovi bongustaĵojn, kiuj kuŝas apude en la poŝoj.

Sciencistoj eltrovis kiel fortimigi la birdojn. Oni devas rigardi ilin rekte en la okulojn. Tion ili ne ŝatas. Sed tio signifas, ke la ferianto devas ĉiam esti tre atentema.

Kial?

Pli kaj pli da homoj havas nun tatuojn.
Strangaj bildoj, ne nur floroj. Kial malbeliĝo nur?
Ĝi ofendas la okulojn.

Malbelec' min ĝenas. Mi ne ŝatas tion.
Eĉ la muŝo, kiu venas senintence el natur',
estas por mi nur fripon'.

Malfruiĝas buso. Longe mi atendas.
Ĝojo pro la tempa pluso mankas pro la konsekvenco'.
Kial? Kial? Ĉiu plendas.

Ĝustatempe esti, tio ne plu eblas.
Ĉe haltejo devas resti ĉiu por la rekompenco',
se la buso vere venas.

Sed la suno brilas. Belas la vetero.
Kial vi malmulte miras pro la manko de problem'?'
Ĉiam restas la espero.

Ĉie estas ĝojo. Serĉu ĝin zorgeme,
en la mond' sur ĉiu vojo eĉ en tiu ĉi poem'.
Tial ridu jam matene.

Kelkaj notoj...

Ĉu vi rimarkis la iomete malsimplan rimskemon de tiu poemo?

En la unua strofo la fina silabo de la unua linio trovas la saman silabon en la tria linio. Por la dua linio la respektiva rimo aperas en la kvina lino.

Do, estas 1-A, 2-B, 3-A, 5-B.

Sed kie estas la partnero por la fina silabo de la kvara linio?

Vi trovas ĝin en kvara linio de la sekvanta strofo!

1-a strofo: 1-A, 2-B, 3-A, 4-C, 5-B.

2-a strofo: 1-D, 2-E, 3-D, 4-C, 5-E.

Tiu strukturo validas ankaŭ por la aliaj strofoj.

Kial? Kial?


Ne demandu min!

Lulkanto*

Dolĉe dormas jam la sun, nun montriĝas lun'.
Ĉiu stelo en ĉiel' brilas kiel juvel'.
Brilas kiel juvel', en la nokta ĉiel'.
Dolĉe dormu nun, ankaŭ dormas sun'.

Dolĉe sonĝas la marmot', sonĝas pri karot'.
Kuŝas ĉarme en kavern', lumo de l' lantern'.
Lumo de l' lantern', por marmot' kavern'.
dolĉe sonĝas ĝi, ankaŭ sonĝu vi.

Dolĉe paŭzas pluv' kaj vent', pace en konsent'.
Ĉiu kuŝas en trankvil', krom la krokodil'.
Krom la krokodil', ronkas dum trankvil'.
Dolĉa la bruet', ronku en duet'.



Kelkaj notoj...

La ‚Lulkanto‘ estas ankaŭ legebla sur mia hejmpaĝo kaj tie intertempe en Esperanto kaj en la germana lingvo. Mi tre ĝojas ke mi ankaŭ ricevis francan version, kiun skribis samideanino el Francio.

Krome mi komponis belsonan melodion por tiu teksto. Kaj la unuan strofon mi ankaŭ prezentas en mia eta pdf-infanlibro ‚Mupo lernas‘. En tiu rakonto la protagonisto Mupo kuŝas en malsanuleja lito kaj ne povas dormi. Feliĉe, ke la najtingalo alvenas kaj mallaŭte kantas. Post dufoja ripeto Mupo trankvile ekdormas.

La kantoteksto kaj la melodio estas faritaj por infanoj. Estas ja lulkanto kiu helpas la infanon malstreĉiĝi por pli bone trovi la noktan ripozadon.

Vigla melodio*

Lasu sunon brili
kie ajn vi estas nur.
Lasu botojn marŝi.
Eku nun, per ĉiu krur'.

Vent' kaj nuboj sen potenc',
malproksime kuŝas senc'.

Prenu dorsosakon,
nur kantaro en la poŝ'.
Postlasu tabakon.
Estas grava ĉiu groŝ'.

Liberec', freŝa aer'
helpas kontraŭ la mizer'.

Sunradioj brilas en la kor',
la feliĉo ne plu estas for.

Sunradioj helaj, kun varmec',
sunradioj, la ĉiela pec'.

Kelkaj notoj...

Raportoj pri migrado ĉiam impresas min. Mi mem nur en mia juneco kuraĝis fari tiajn vojaĝojn. Kaj mi nur biciklis. Piediri ne estas la ĝusta movado por mi. Sed mi bone rememoras bonajn ekskursojn. Mi iam eĉ biciklis sole de Hamburgo al Nederlando kaj returne. Mi bezonis entute du semajnojn kaj je la lasta tago mi veturis pli ol 200 km. Ankoraŭ hodiaŭ mi fieras pro tio.

Tiutempe mi ne planis multe. Mi malzorgeme provis ĉiutage atingi junulargastejon antaŭ noktiĝo. En Nederlando mi havis paneon kaj evidentiĝis ke mi ne sukcesus. Sed du fremdaj nederlandanoj helpis min. Ili metis mian biciklon en sian aŭton kaj veturigis min ĝustatempe al la proksima junulargastejo. Tio estis bela sperto.

Kompreneble estis ankaŭ malbonaj spertoj. Sed tiuj mi preskaŭ plene forgesis.

Somero

Somero kun suno ĝojigas la homon.
La homo tre ĝojas pro tiu feliĉ'.
Varmeco ebligas forlasi la jakon.
Ni estas kontenta pri tiu kondiĉ'.

Tre grava kondiĉo por bela ferio.
Ni kuŝas sur plaĝo en varma aer'.
Ripozo sur sablo, malstreĉa defio.
Naĝado en akvo, agrabla afer'.

Sed por kamparano tre riska afero
ĉar mankas la pluvo, por plantoj turment'.
Sekeco tro longa, tre granda danĝero.
Ekbrulas facile la pajla tegment'.

Arbaroj jam brulas, la cervoj forfuĝas.
Leviĝas la fumo, malhelas ĉiel'.
Danĝero por vivo, do ĉiu forkuras.
La perdo de ĉio, eĉ de la juvel'.

Juveloj ne povas alporti la savon.
Batal' kontraŭ fajro, batalo sen fin'.
La ŝprucoj el akvo reduktas damaĝon.
Pri pluvo decidis nur bona destin'.

Kelkaj notoj...

La somero 2022 en Germanio estis tro varma, tro seka kaj tre sunplena. En junio, julio kaj aŭgusto estis pli ol 800 horoj da sunbrilo. En julio, la temperaturo en Hamburgo eĉ atingis 41 gradojn. La akvonivelo de la riveroj draste falis, kaj tre malmulte pluvis. Grandaj areoj de herbejo velkis. Krome estis ankaŭ multaj arbaraj fajroj. La kamparanoj timis malbonajn rikoltojn. Homoj, kiuj laboris en la libera aero, devis ŝviti multe.

Malgraŭ tiuj raportoj, estis multaj homoj, kiuj ĝuis tiun someron, refreŝante sin en la banejoj aŭ ĉe la maro. Kaj vespere oni povis longe sidi ekstere. Tiam la temperaturoj estis vere agrablaj.

Marknomoj

LUPO, LADA, VENTO - KIA, POLO, VITO
estas nomoj sen akcento, bonaj aŭtoj kun kvalito.

Ili ĉiuj uzas - lingvon Esperanto.

Tial ĉiu gelernanto tiun lingvon ne rifuzas.

Fiat: RITMO, PUNTO - GUSTO, ONKO, ARKO.

Ĉu aĉeto aŭ nur prunto? Kiu estas bona marko?

Aŭto aŭ nur kafo? - Prenu la biciklon!

Preterlasu la biskviton. Ne maltrafu per la pafilo!

Opel: ASTRA, TIGRA. - Cigaretoj KORA.

Ĉu BALENO estas nigra? La Suzuki aŭto glora.

Esperantaj nomoj - ĉie en la rondo,
multaj varoj en la mondo, tion ŝatas ja la homoj.

Kaj nun varbu ankaŭ vi, ĉar mi ne deziras pli.



Kelkaj notoj...

Multaj produktoj ricevas Esperantajn nomojn en komerco. Fama ekzemplo estas la limonado MIRINDA, kiu estas internacie konata. Ĉiam denove aperas novaj marknomoj. Sed ŝajnas ke kelkfoje la signifo de la nomo ne estis adekvate ekzamenata.

ONKO estas marknomo por kafo. Mi jam delonge de tempo al tempo aĉetis tiun kafon kaj ĝuis la bonan guston. Mi neniam pensis pri la signifo de la nomo. Nun mi scias ke onko estas (laŭ PIV) tumoro, precipe maligna. Kompreneble tio difektas mian apetiton.

Kaj kion vi pensas pri RABOBANK, nederlanda banko? Ĉu vere estas fidinda kompanio, se jam la nomo sugestas, ke ĝi estas ŝtelisto?

Tamen varoj kaj firmaoj kun esperanta aŭ esperanto-aspekta nomo montras al ĉiuj, ke Esperanto estas tutmonde uzata. Informu vian najbaron pri tio.

Uzu varbadon por varbado!

Postparolo

Kaj nun ni atingas la finon de mia eta poemaro. Ne timu! Mi ne planas prezenti pluan interpretadon. Tion vi povas fari mem. Je la fino de mia lingva ludado ekkaptis min interesa demando. Temas pri la elizio de la o-finaĵo, kiu estas permesita per la 16-a regulo de la Fundamento [*4].

Ne ĉiu ŝatas tiun regulon. Jam Walter Borgius [*6] tre forte kritikis la kutimon, forlasi la o-finaĵon en poemoj. Li eĉ pensis ke artefarita lingvo neniam taŭgas por lirika poezaĵo. Tio kompreneble ne estas mia opinio. Tamen skribante miajn poemojn mi ofte rimarkis la malfacilaĵojn kiuj vere kuŝas en Esperanto. La elizio de la o-fianaĵo povas kaŭzi nepronceblajn vortojn. Mi klopodis eviti tion.

Sed eĉ Zamenhof forlasis la o-finaĵon en <Ho mia kor'>. Do, evidentiĝas ke la 16-a regulo faras Esperanton multe pli fleksebla.

La demando, pri kiu mi pensis, estas nun la jena:

Kial ni nur tre malofte uzas tiun liberecon dum normala parolad' kaj en skribitaj tekstoj, kiuj ne estas lirik'?

Tiu frazo estas bone komprenebla malgraŭ la du elizioj. Sed silaboj kun du konsonantoj je la fino estas kelkfoje nur malfacile prononcebla, sed aliaj kombinaĵoj ne kaŭzas problemojn. *Ekzemple: -kofr', -lingv', -vafl', kompare al -komenc', -poent', -skolt'.*

Transformo de la unuaj du frazoj de la Biblio gvidus al:

1 En la komenc' Dio kreis la ĉielon kaj la teron. 2 Kaj la ter' estis senforma kaj dezerta, kaj mallum' estis super la abismo; kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo.

En tiuj frazoj mi hezitas forlasi la o-finaĵon de la vorto <Dio>. Mi opinas ke tio pli bone sonas ol <Di'>. Ankaŭ <spirito> ne perdis la o-finaĵon, ĉar alikaze post <t> venus simila <d>.

Kaj la radikoj de la vortoj <abismo> kaj <akvo> estus malfacile prononcebla sen la o-finaĵo.

La apliko de la 16-a regulo ne estas deviga. Vi povas mem decidi kiel vi volas paroli aŭ skribi.

Jen mia konkludo: Esperanto estas belsona lingvo. Per kelkfoja elizi' de la o-finaĵ' ĝi povus soni eĉ pli vigle.

Danko

Multan dankon al ĉiuj, kiuj helpis malaperigi la erarojn. Tio estas ja peza laboro, ĉar ne temas nur pri ortografio. Gravis ankaŭ la kontrolo de la rimoj kaj la metriko.

Specialan dankon mi ŝuldas al Theodor Wittenberger el Germanio kaj Vejdo el Ĉinio. Ili donis al mi multajn proponojn por pliboniĝo.

Krome mi estas tre dankema por la inspiroj, kiujn mi trovis en la libro ‚Koploj kaj filandoj‘ de Jorge Camacho [*7].

Fontoj

[*1]

https://eo.uncyclopedia.info/wiki/Esperantisto#Devoj_de_Esperantisto

[*2]

<https://www.youtube.com/watch?v=X3ULSYWtm-o>
Hund starrt jeden Tag aus dem Fenster

[*3] <http://esperanto-klaus.de/>

Erik Tantal, Misteroj

[*4]

https://eo.wikipedia.org/wiki/Gramatiko_de_Esperanto

[*5]

<http://literaturo.org/HARLOW-Don/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr54/hpoemo.html>

[*6]

<https://esperanto.berlin/de/borgius1909/>

[*7]

Jorge Camacho kaj Mondial, Koploj kaj filandroj, 2009, Novjorko

Kolofono

Titolo

Strangaj nuboj

Aŭtoro

Erik Tantal, alinome Klaus Friese

Versio 3.0

3-a eldono 2022

Aŭtoraj rajtoj

© Klaus Friese, Hamburg

Retpoŝto

friese@esperanto-hamburg.de

Kovrilo kaj desegnaĵoj

Erik Tantal

Hejmpaĝo

esperanto-klaus.de

Apendico

Muzikfolioj por tri kantoj:

- Printempo
- Lulkanto
- Vigla melodio



Grandan dankon al Jan Friese, kiu zorgis por la plibonigo de la melodioj kaj la muzika aranĝado.

La melodioj estas prezentitaj ankaŭ sur mia hejmpaĝo.

www.esperanto-klaus.de

PRINTEMPO

Klaus + Jan Frieze



Nun flo- ras la pom- ar- bo. La vin- tro es- tas for.

5



Prin- tem- pa vig- la ar- do. Prin- tem- pa flor- o- dor'.

9



Var-maj sun- ra- di- oj tu- șas vi- an haũ- ton kun a- bund'.

13



En la mo- la herb' vi ku- șas. Ĝo- ju pri ĉi- u se- kund'.

17



Sen-ĉe- se pe- pas bir- doj nun. Be- le- ga pre- zent'.

21



Ne es- tas nu- boj, nur la sun'. Prin-tem- pa fir- ma-ment'.

LULKANTO

Klaus+ Jan Friese

1. Dol- çe dor-mas jam la sun', nun mon-tri- ĝas lun'

Musical notation for the first system, measures 1-4. The score is in 4/4 time. The treble clef part begins with a quarter note G4, followed by quarter notes A4, B4, C5, and a half note D5. The bass clef part begins with a quarter note G2, followed by quarter notes A2, B2, C3, and a half note D3.

5. Ĉi- u ste-lo en ĉi - el' bri- las ki- el ju- vel.

Musical notation for the second system, measures 5-8. The treble clef part begins with a quarter note G4, followed by quarter notes A4, B4, C5, and a half note D5. The bass clef part begins with a quarter note G2, followed by quarter notes A2, B2, C3, and a half note D3.

9. Bri- las ki- el ju- vel', en la nok- ta ĉi - el'.

Musical notation for the third system, measures 9-12. The treble clef part begins with a quarter note G4, followed by quarter notes A4, B4, C5, and a half note D5. The bass clef part begins with a quarter note G2, followed by quarter notes A2, B2, C3, and a half note D3.

13. Dol- çe dor- mu nun, an- kaŭ dor-mas sun'.

Musical notation for the fourth system, measures 13-16. The treble clef part begins with a quarter note G4, followed by quarter notes A4, B4, C5, and a half note D5. The bass clef part begins with a quarter note G2, followed by quarter notes A2, B2, C3, and a half note D3.

VIGLA MELODIO

Klaus + Jan Friese

♩ = 180

La- su su- non bri- li ki- e ajn vi es- tas nur.

5

La- su bo- tojn mar- ŝi. Ek- u nun, per ĉi- u krur'.

9

Vent' kaj nu- boj sen po- tenc', mal-prok- si- me ku- ŝas senc'.

13

Sun- ra di- oj bri- las en la kor', la fe- li- ĉo ne plu

17

es- tas for. Sun- ra- di- oj hel- aj, kun var- mec', sun- ra-

21

di- oj, la ĉi- el- a pec'.

